



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1997 — 1


(JANUARO - FEBRUARO - MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



Babel-oj...



Kaj Hervé Bazin

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangaul)	2
Babel-oj	3-4
Hervé Bazin (B. Cheverry)	5-6
Franz Schubert (fino)	7-8
La Kvizo de Bernard Golden	9-10
Iom pri Maljuneco (S. Boniol)	11
La sekreto de la reĝino (1a parto)	12-13
Por via distro-Nia konkurso	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

Por eviti kelkajn malfacilaĵojn spertitajn dum la Printempa Infan-renkonto en 1996, kaŭze de tro granda sukceso pri la tro granda nombro da junaj partoprenantoj, la Komitato decidis akcepti nur limigitan nombron da geknaboj. Ĉi jare verŝajne ĉeestos la Printempan Renkonton proksimume 70 personoj. Fine de la semajno (12/19-04), sabaton vespere kaj dimanĉon okazos en la kastelo la jara Ĝenerala Kunveno de la Centr-Okcidenta Federacio kaj kunveno de la esperantistaj Radio-Amatoroj.

Pri la somero ne estas eble multon diri. Kiel lastan jaron la aliĝoj ankoraŭ ne estas multaj. Ili pli kaj pli alvenas lastmomente, ankaŭ per telefono. Do ni atendu. Aldone al la programo aperinta ni povas anonci, ke la 29-an de junio okazos regiona Esperanto-Renkonto en Fontevrault l'Abbaye. Bona okazo por la tiamaj ĉeestantoj en Gresillon viziti la mirindan abatejon...kaj partopreni la honorvinon responde al la invito de la tiea urbeŝtraro.

Kaj nun, jen alvoko. Vi, bonaj amikoj, kiuj vizitas Gresillon, ofte aŭ de tempo al tempo, kiuj konscias, ke la Esperanto-Domo estas nepre necesa parto de la Esperanto-Movado, pensu, ke jam de 45 jaroj kelkaj el la nunaj respondeculoj laboras, ne por si mem, sed por Esperanto kaj por vi. Ili estas ne nur "malnovuloj" sed ankaŭ "maljunuloj". Ĉu kelkaj el vi ne povus helpi ilin, laŭ viaj kompetentecoj?

NI FUNEBRAS

Kvankam ŝi ne povis, pro malsano, jam de pluraj jaroj partopreni en la esperanta vivo, Jacqueline TRESORIER tiom aktivis dum longaj jaroj por Esperanto, ankaŭ en Gresillon, ke ŝi estis multkonata. Ŝi forpasis kaj ŝiaj geamikoj elkore kondolencas ŝian edzon kaj ŝiajn gefilojn.

Alia bone konata amikino de Gresillon mortis dum la vintro. André KRISTOS multfoje vizitis la kastelon kun sia edzo, kiu manlabore kaj per prelegoj partoprenis en la vivo de la Kulturdomo. Ŝia filo, Jean-Luc, ankoraŭ regule gvidas grupon de infanoj kaj instruas Esperanton. Al Jean-Luc, al lia patro ni sendas niajn plej amikajn kaj elkorajn sentojn.

ESPERANTO TRA LA MONDO

EN AUSTRALIO: La temo de la Universala Kongreso (19-26 de Julio) en Adelaido estos: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo". La antaŭkongreso "La plejoj de Aŭstralio" celas, dum kvin tagoj, montri la ĉefajn vidindajn lokojn de la lando. La postkongreso vizitos Nov-Zelandon.

EN ĈINIO: De septembro 1996 ne plu ĉeestas interpretisto por la angla lingvo dum la gazetaraj konferencoj de la reprezentanto de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio. Ĉiuj raportistoj eksterlandaj devas uzi la ĉinan lingvon por fari demandojn.

Cetere, dum la unua azia kongreso de esperanto, kiu okazis lastsomere en Sanhajo, Prof. Lee Chong-Yeong deklaris, ke la mondo bezonas internacian lingvan ordon, en kiu ĉiuj homoj uzos neŭtralan internacian komunan helplingvon por internacia komunikado.

ESPERANTO KAJ MUZIKO: La nova prezidanto de Muzika Esperanto-Ligo, la usona komponisto David Gaines, de Baltimore, premieris pro verko por blovinstrumentoj, titolita "Spiritstato". Li ĵus prezentis sian Esperanto-simfonion por mezsoprana voĉo kaj granda orkestro. La tekstoj de la kvar movimentoj venas de Zamenhof, Marjorie Boulton, penka Papazova kaj Gaines mem.

Aperis en Hispanio, por internacia vendado, disko titolita "Esperanto". Tiu disko estas produktita de konata komponisto - produktisto Elbosco kaj eldonita de Warner Music Spain. La dek pecoj estis kantataj de diverslandaj korusoj en diversaj urboj en la mondo.

EN MARSEJO: La 3-an de februaro, en la Scienca fakultato de Marseille-Saint-Charles, malfermiĝis kurso "Interlingvistiko kaj esperanto". Estos unu el la 10 valoraj unuoj en la kadro de la ekzameno DEUG. Profesoro: Michel Challulau.

AMASA JUNULARA RENKONTO: 350 partoprenantoj rendevuis en la Internacia Seminario de la junaj germanaj esperantistoj, en Freiburg 27/12 - 3/1. La estontan IS oni aranĝos verŝajne en Traben-Trarbach, fine de 1997.

NACIA ESPERANTO-MUZEO: La 26-an kaj 27-an de aprilo oni festos, en Gray (Haute Saône - Francio) la 20-an jariĝon de tiu ne sufiĉe konata muzeo. Inter aliaj ĝi prezentas 6000 librojn, centojn da gazetoj, revuoj, en la internacia lingvo. Informas: Nacia Esperanto-Muzeo, 19, rue Victor Hugo, 70100 GRAY, Francio.

NOVAJ LIBROJ: Oni nun povas legi en esperanto libron de unu el la plej popularaj francaj verkistoj; aperis "La maljunulino, kiu marŝis en la maro" de San Antonio (Frederic Dard), tradukita de Armelle Le Quint kaj Jak Le Pail.

"La oldulo kaj la maro", de E; Hemingway en traduko de F. de Diego.

"La bildstria gvido al genetiko" de L. Gonick kaj M. Wheelis, tradukita de Sung Ho Cho.

Reeldono de la konata romano de Johan Valano (Claude Piron) "Ĉu vi kuiras ĉine?"

En la literatura serio de "Franca Esperantisto", lastatempe aperis reeldono de la traduko de la "Fabloj" de La Fontaine tradukita de L. Thévenin kaj la unua parto de "Reĝo sen distriĝo" de Jean Giono, tradukita de Pierre du Cheyron de Beaumont.

"Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludoj", kvara albumo en esperanto de Asteriks.

KIEN IRI EN 1997?: 53-a Internacia Junulara Kongreso en Assisi, Italio, 24-31a de julio. Informas: A. Amerio, via Cumlana 45, I-10141 Torino.

Internacia junulara renkontiĝo, 1-7a de aŭgusto, en Sain, t-Raphael, Francio. Informas: Pascal Lecaille, B.P.3019, FR-69394 Lyon Cedex 03.

SAT-Kongreso en Augsburg, Germanio 2-9a de aŭgusto. Informas: Waterloostrasse 21, DE-86165 Augsburg.

Katolika Kongreso de IKUE en Romo kaj Rimini, 31/8 7/9. Adreso: Centra Oficejo de IKUE, via di Porta Fabbrica 15, I-00165, Roma, Italio.

Internacia feriosemaĵo de TANEF (esperantista fako de la Asocio de la Naturamikoj), en Kniebis, apud Freudenstad Germanio, 9/16a de aŭgusto. Adreso: Erna Döring, pf 225, CH-4003, Basel, Svisio.

~~~~~

## BABEL-oj

Kiam li elŝipiĝis el la Arkeo, Noa ekkultivis viton tro arde, kio eskuzindas post kvardek-taga vivado meze de akvo. Oni do rajtas pensi, ke liaj posteuloj forlasis paŝtadiviron kaj nomadismen. Ili fariĝis terkultivistoj. Tio devigis ilin observi iun disciplinon: la ritmon de semado kaj de rikoltado. Ĉar ili bezonis novajn ilojn, kreiĝis nova kategorio de laboristoj, la metiistoj, malnomadaj. Vilaĝoj naskiĝis apud la kultivitaj lando-partoj. Familioj, klanoj grupiĝis sub patriarka aŭtoritato. Baldaŭ, pro manko de spaco, grupoj migris kaj fondis pliajn domgrupojn. Necesaj interŝanĝoj naskis alian kategorion de laboristoj: la komercistoj. Kreiĝis la civito kaj la socia hierarkio, kiu siavice kreos kvaran grupon de civitanoj: la civitoficistojn. Iom post iom naskiĝis la nacio kaj la lando.

Laŭ la biblia legendo la filoj de Noa, Sem, Ŝam kaj Jafe estas la tri hom-fontoj, ĉar iliaj posteuloj konkeros la Mondon. Sed tiuj posteuloj ŝajne ne konkeris pli ol malvastan terenon, tiun nun konatan, kiel Mezopotamio. La ĉefurbo estis Babilono, tiam ankoraŭ ne tre granda nek brila urbo. Tiam intervenas la Genezo, kiu diras (katolika interpretado): "Venu, ni konstruu urbon kaj turon altiĝantan ĝis la ĉielo kaj ni disfamigu nian nomon antaŭ nia disiĝo tra la tuta mondo"; (protestanta interpretado): "Ni konstruu urbon kaj turon altiĝantan ĝis la ĉielo por ke ni ne disiĝu tra la tuta mondo". Oni povus diskuti pri la diferenco inter "antaŭ nia disiĝo" kaj "por ke ni ne disiĝu". Sed ni daŭrigu la Babel-historion, kiu preskaŭ samas en la diversaj tradukoj de la Biblio. "La Tero tiam konis nur unu lingvon kaj nur unu parolmanieron. Ĉar tiuj popoloj iris orienten kaj trovis kamparon en Sennan (aŭ Ŝinean, en la hebrea lingvo: Mezopotamio), tie ili loĝis. La Sinjoro malsuprenvenis viziti la urbon kaj la turon konstruitajn de la filoj de Adamo. Li diris: "Ili estas unu popolo kaj ĉiuj parolas la saman lingvon; nun nenio povus malhelpi ilin realigi ĉiujn iliajn projektojn. Mi konfuzu ilian lingvon por ke ili ne plu komprenu unu la alian." Tial la Sinjoro dispelis ilin en ĉiujn partojn de la mondo: kaj ĉesis la konstruado de la urbo kaj de la turo. Pro tio la nomo de la urbo estis Babel, kiu signifas "konfuzo".

La juda historiisto Flavio Jozef (37-98) skribis, ke Nemrod, unu el la pranepoj de Noa iom post iom fariĝis la ĉefo, sed ĉefo tiraneca, kiu provis persvadi la popolon elekti lin sia protektanto kontraŭ Dio, kiu povus duafoje superakvegi la Teron per nova diluvo. Estis konstruita altega turo por venĝi la morton de la prauloj. La popolo rapide konstruis tiun turon. La cirkonferenco estis tiel granda, ke la turo aspektis malpli alta ol ĝi vere estis. Ili uzis brikojn, kaj bitumon kiel cementon. Dio konstatis, ke la puno trudita al iliaj prapatroj ne efikis. Li ne detruis ilin, sed dispartigis ilin paroligante diversajn lingvojn al ili.

Oni konstatas, ke la konstruo de la giganta turo celis ankaŭ la protektadon de ĉiuj tieaj vilaĝoj kontraŭ ebla superakvigo de Tigro kaj Eŭfrato. La Turo ludis similan rolon al tiu de la mezepokaj feŭdaj kasteloj. Babel ne estis nur megalomania entrepreno sed ankaŭ kolektiva organizo, unu el la plej grandaj teknikaj realigaĵoj de la primitiva homaro.

Juda ekzegezo de la Malnova Testamento diras: "La konstruata turo estis tiel alta, ke la transportado de bitumo kaj brikoj, de la piedo ĝis la masonistoj ĉe la supro postulis unu tutan jaron. Dum la konstruado laboristoj ĵetis sagojn al la ĉielo. Tiuj refalis sango-kovritaj. La laboristoj timis, ke ili mortigis la loĝantojn de la ĉielo. Sed temis pri ruzaĵo de la Sinjoro... Ankaŭ la malkonstruado de la Turo (pri kiu la biblia tradicio ne parolas) estis mirakla. La grundo malfermiĝis kaj glutis la trionon de la monumento. Fajro falanta de la ĉielo voris plian trionon. La restanta triono estis giganta ĉar ĝia ombro kovris vojon de tritaga marŝado".

Ankaŭ en la asira-babilona religio oni trovas la babel-miton: "...la praaj homoj, orgojlaj je forto kaj grando, malestimis la diojn; ili konstruis altegan turon sur la loko, kie poste staris Babilono...Sed ventoj helpis la diojn kaj detruis la turon super la laboristoj; la nomo de la ruinaĵoj estas Babel, kaj la homoj estis devigataj paroli malsamajn lingvojn".

Iu latina poeto, Gratien (4-a j.c. a.K.) rakontas, ke Gigantoj ribelantaj kontraŭ Zeŭso, amasigis montojn por atingi Olimpon, Ankaŭ ĉe la okcidenta bordo de Afriko oni rakontas, ke "iam, la homoj amasigis ĉiujn

gren-pistujajn. Ĉar mankis unu por fini la supron, la baza pistujo estis deprenita, kaj la tuta turo disfalis. La homoj estis tiel teruritaj, ke ili parolis novajn lingvojn."

Kaj nun, de pli ol dumil jaroj, homoj provas pruvi la realon de Babel-turo kaj serĉas ĝiajn ruinojn. La antikvaj vojaĝantoj kaj la modernaj arkeologoj akordiĝas pri la fakto, ke la Babel-turo staris en, aŭ tute apude de Babilono. Sed kelkaj asertas, ke la nomo Babel devenas de la hebrea radiko "babal" (konfuzi), aliaj, ke ĝi devenas de la ĥaldera radiko "bab-ilu" (pordo de Dio). Fondita dum la 3-a jarmilo la urbo formis kvadraton kun lateroj 22 km. longaj, La ĉirkaŭa murego estis 25 m. alta. Ruinigita de la Persoj, fariĝinta ĉefurbo de la Azia Imperio de Aleksandro la Granda, Babilono restis en la memoro de la homoj. Dum la 12-a jarcento hispana rabeno, Benjamino de Tudele vizitis Babilonon. Li rakontis: "Meze de vasta ebena, staras amasega konstruaĵo simila je montaro. Sur kvadrata bazo ĝi staras, kiel piramido... Oni vidas neniu ŝtuparon, neniun pordon. Tio fortigas la opinion, ke oni supreniris per eksteraj deklivoj... La konstruaĵo estas farita el grandaj dikaj brikoj, sun-sekigitaj kaj cementitaj per bona kalko kaj ankaŭ per speco de tero; la brikoj de la fundamento estis fajro-kuiritaj. Ĝi certe estas la antikva Babel aŭ Turo de Nemrod. La loko tion pravas, sed, plie, la tieaj loĝantoj estas certaj pri tio kaj ankoraŭ nun nomas ĝin, arab-lingve, Babel, kiun ili prononcas "Babil"."


La rezultatoj de la modernaj arkeologiaj serĉadoj pensigas, ke la Babel-turo estis iu "ziggurat", piramido kun terasoj grade malgrandiĝantaj. Eble la "ziggurat" estis temploj en kiuj povus malsuprenveni iu dio aŭ diino, aŭ simpla vojo supren al templo konstruita proksime al la ĉielo. Sur kelkaj brikoj oni trovis kojno-formajn skribaĵojn, kiuj ĝustigus la opinion, ke la "ziggurat" estis sanktejoj. Sed la kojno-formaj skribaĵoj plej ofte rilatas kun ... la librotenado de la riĉaĵoj de la templo. Neniu rilatas kun la konstru-tekniko. Ĉu vere la Babel-turo estis la pratipo de la "ZEiggurat"?

La artistoj de la kristana erao konceptis Babel-ojn laŭ sia imagpovo. Ili pre-

zentis ilin rondaj, aŭ dum konstruado ruinigitaj, aŭ trafitaj de la dia kolero, referenciĝante pli malpli fantazie al la teksto de la Sanktaj Skribaĵoj. Babel, en la freskoj de St Savin estas romanika sonorilturo de la 12-a jarcento; Herzog de Bedford (15-a j.c.) miniaturis beletan italicilan konstruaĵon kun ekstera ŝtuparo; Pieter Brueghel (16-a j.c.) proponas fortikaĵon kun flankaj apogiloj.

Sed, ne gravas! Sanktejo, urbanisma mastroverko, majstropeco en muzeo aŭ biblia mito senhonoriganta la homan orgojlon, la Babel-turo estas kolektiva emanaĵo de eble la unua el la Grandaj Realigaĵoj en la mondo.

El "L'épopée des grands travaux"  
René Poirier



# HERVE BAZIN.

En februaro 1996 amasinformiloj konatigis, almenaŭ en Francio, la subitan forpason, en Angers, de la fama franca literaturisto Hervé Bazin, 85 jaraĝa. Ĉar denaske, li estis Anĵu-ano, en tiu regiono, kie troviĝas Grésillon eble pli ol en aliaj regionoj oni rememorigis lian verkaron. Pra-nevo de la jam famkonata René Bazin, pra-nepo de samnoma Ferdinand, oni povas diri, ke denaske li apartenis al familio de literaturistoj, kvankam la patro estis juĝisto kaj profesoro pri juro, kaj la patrino, filino de deputito apartenis al la burĝa societo, kio enkondukis ne-elpenseblajn reagojn ĉe la ribelema filo! Despli, ke la patro, profesie postenigita en Ŝangaj (Ĉinio) iris tien kun la edzino lasante la tri infanojn ĉe la patra avino kun kiu ili pasigis la vintrajn sezonojn en Angers mem kaj la somerajn en alia parto de la provinco, Segré. Kiam la avino forpasis, la gepatroj revenis en Francion, instaligis en la kampara bieno kaj direktis la infanojn al diversaj regionaj kolegioj. Por Hervé komenciĝis tumultema junul-vivo. Post la kolegiaj studoj li enskribiĝas en la Katolika Universitato en Angers, kadre de jura specialaĵo. Sed, rapide, li forlasas la studadon, malakordiĝas kun la familianoj kaj fuĝas al Parizo. Tiam, studento en la franca ĉefurbo, li devas mem perlabori sian vivon. Devige li spertas diversajn taskojn, el kiuj vendadon en subĉielaj bazaroj... kaj aliaj, kiuj povus konduki lin en malliberejon, sed kiuj, pli poste, utilis al li. Li mem asertis ke "memoro de romanisto similas fridujon el kiu oni ĉerpas laubezone". Fakte, de 1935 ĝis 1945, kiel multaj francoj, li devis elporti malsekajn jarojn, vivante el labor-elturnaĵoj, kiuj, okaze, alfrontigis lin al polico.

Jaroj pasas. Li sukcesas kunlabori en parizaj gazetoj kaj en 1947, jam tridek ses jara, li publikigas poemojn, el kiuj "Tagoj", kiu alportas al li la premion "Apollinaire". Unu jaron poste, lia unua romano "Vipère au poing" (Vipuro ĉe la pugno) renkontas grandegan sukceson. Sendube, lanĉita kiel bombo, de la fama eldonisto Grasset, tiu verko alportis al Bazin tujan famon kaj sekve grandkvantan vendadon. Revivigante la adoleskajn jarojn de Johano Rezo ( nomo donita al la heroo plunomita "Brasse-

Bouillon" (Sup-Kirlanto), kaj tiu de ties du fratoj, same edukitaj, (oni povas diri "sov-aĝe"), en familia bieno malbone prizorgata, la verkisto revivigas aŭtentikajn faktojn, kapablajn emociigi homojn, ĉefe tiujn, kiuj, same, diversgrade suferis tiamajn hejmajn konfliktojn.

Tamen, se infaneco, kiel tiu elportita de Hervé Bazin, vekis ĉe li amarajn memor-aĵojn, oni povas supozi, ke aliparte ĝi kontribuis al formado de eksterordinara kritik-spirito, kaj evidentiĝas, ke patrino, kiel "Folcoche" ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la verkoj de Bazin. En ili, plej ofte, la romanisto pli larĝe etendis siajn kritikojn al sia socia medio kaj ties "dec-aĵoj". Eble amuzos vin la traduko de la vorto "Folcoche", kromnomo donita al la patrino. Fakte ĝi originas el loka kampara folkloro, en kiu la vorto "coche" signas la in-seksan porko (cochon), kaj en malnovaj rakontoj tiaj "coches" (elp. koŝ) voris siajn ĵusnaskitajn etulojn; la unua parto de la vorto "fol" signifas "frenuzulino".

Ni revenu al la romanisto, ĵurnalistoj kaj poeto, kies verkaro entenas ne nur rememoraĵojn de malakceptata junaĝo sed ankaŭ enkondukas multajn sinsekvantajn kreaĵojn, per pikema tono kelkfoje eĉ kruela. Kvarfoje li edziĝis kaj sepofoje patriĝis. Dum kvindek jaroj li devis zorgi pri la edukado de junaj infanoj. La lasta estis nur dekjara, kiam la patro forpasis. Do ni ne miru, ke la verkaro de Hervé Bazin grandparte estas konsiderata, kiel redono de la evoluo de la moroj dum la dua parto de nia jarcento. Fakte, el liaj kreaĵoj, "Le Matrimoine" (x) "Sinjorino Eks" perfekte elmontras la ŝanĝiĝojn okazintajn en nia moderna familia socio, malfirmecon, rompiĝojn, fendetojn, eksedziĝojn. Paralele li priskribas la neforgesindan rolon de la infano kaj la patrajn sentojn ofte ne agnoskitajn. En "L'école des pères" (Instruado al patro) Bazin priskribas la necesan adaptiĝon de la rolo de la patro post la jaro 1968. Tra la verkoj de Bazin oni povas konstati, ke de tiu dato, la patra, ankaŭ gepatra, pensmaniero kaj ĝia aplikado, devas kompromisi, akcepti mez-aranĝojn, frante al la lernejaj studoj, distroj, televidaj prezentoj, kamaradaj interrilatiĝoj; sekve, vole nevole, estis konstruita iu familia demokratio bazita sur komprenemo kaj indulgemo. La tuta redono de tiuj romanoj, kun tona amuza aŭ venĝema, ironia aŭ

# KIUJ NEGLEKTAS GRAMATIKON

amoplena elvokas situaciojn bone konatajn de multaj gepatroj. En "La morto de la eta ĉevalo", parte aŭtobiografia, oni retrovas la patrinan tenerecon esprimatan ĉe la fino de la romano: "Esti mem amema patro pli bone venĝis min ol la verkado de "Vipuro ĉe la pugno" (verko tre malfavora al lia patrino... kun kiu, onidire, li konsentis repaciĝi en 1956).

Mi ne povas ĉion citi el la ampleksega verkaro de Hervé Bazin, kiu restos, kiel estis Balzac unu jarcenton kaj duonon pli frue, preciza, mokema raportisto pri nia epoko, ĉefe pri la burĝa franca societo, kiu rompas la lastajn ligojn retenantajn ĝin al malnovaj vivsentoj kaj vivmanieroj. Pro tio la verkaro de Bazin prezentas psikologian kaj sociologian valorojn. Proklamita, en 1975, la plej bona franca romanisto dum la antaŭaj jaroj, Hervé Bazin estis jam ricevinta la "Alta Literatura Premio de Monako", estis elektita, en 1958, membro de la "Goncourt Akademio", kaj poste prezidanto de tiu fama asembleo. En 1970, liaj verkoj renkontis sukceson en Sovetio, kie li ricevis "Lenin-Premion".

Inter la kinaj adaptaĵoj de la verkoj de Bazin, oni povas citi "La kapo kontraŭ la muron", kaj la faman "Vipuro ĉe pugno" filmita en la Anĵua regiono, kun la neforforgesebla Alice Sapritch, kiel "Folcoche". Pliaj verkoj estis adaptitaj por kinaj prezentoj aŭ, de la verkisto mem, por la televido.

Ĝis siaj lastaj vivmomentoj, (li subite mortis pro cerba atako), li elmontris nekredeblan agemecon. Lia lasta romano, "La naŭa tago" datiĝas de la jaro 1994. Estis anoncita funebra solenaĵo en lia Angers-paroka preĝejo, sed la organizantoj rapide konsciis, ke ĝi estos tro malgranda. La funebraĵo okazis en la katedralo. Inter la multnombraj ĉeestantoj estis multaj "grand-nomoj" el la franca literaturo. Laŭ lia deziro li estis kremaciita kaj liaj cindroj estis disĵetitaj en la riveron "Maine".

La persa proverbo pravas, kiu diras: "Nia vera tombejo ne troviĝas en la tero, sed en la koro de la homoj".

Bérangère CHEVERRY

(x) Kutime la vorto uzata estas "patrimoine" (heredaĵo venanta de la patro). "Matrimoine" signifas heredaĵo venanta de la patrino.

La bebo pensas, ĉe la kontakto kun mammo de la kara patrino ke la plej bona estas la lakto kaj li suĉadas pro la rafino. Sed evidentos, poste, la fakto, ke li pli ĝuas per bona vino trinkata flue, laŭ katarakto kun nazo ruĝa kiel sangvino.

Prava substituto...  
vivu l'evoluo!

Sed, se li vidas, ve, sur la tablo, en plado, verdon de spinaco li aĉe strabas kun malagrablo kaj ĝin rigardas, ja, kun grimaco. Sed, poste, pro l'popeja konsilo li ekgustumas, kaj, ho miraklo! ŝanĝiĝas tuj la lia profilo, fariĝas li subite Heraklo.

Boniĝis menuo...  
vivu l'evoluo!

Nu, oni diras: l'unua kiso tre milda estas, tre delikata ...jes, vere estas ĝi premiso de io grava eĉ se privata. Por ne tro ŝoki per malpudoro klarigos mi nur per metaforo: "Unua kiso estas aŭroro ja kiun sekvas suno el oro"

Nur krom ĉe statuo estas evoluo.

Mi fine venas al la konkludo, ke kiel vino, spinac' kaj amo tutsame estas pri lingva studo. Unue, lernas ni laŭ l'programo sed, poste decas ke kun fervoro ni dediĉu nin al gramatiko, ĉar ne sufiĉas vortotrezoro, sed nepras studo pri la tekniko.

Kun ŝtrumpo sen truo  
taŭgas ankaŭ ŝuo.

Marcelo

# FRANZ SCHUBERT

( FINO )

... Fakte, en tiu momento, li sidis en la galerio de la teatro, vestita per sia kutima malnova, eluzita jako kaj pantalon. Amiko, kun kiu li sidis, proponis al li sian nigran jakon, sed Schubert rifuzis sin montri, kaj fine oni devis anonci, ke la verkinto jam iris hejmen; sed li sidis tie en la galerio, nerekonita, kaj ankoraŭ aŭskultis kun granda ĝojo la aplaŭdon, kiun lia muziko akiris.

Dum la printempo de 1818, Schubert konatiĝis kun iu grafo Esterhazy, kiu posedis tre luksan domon en Vieno kaj belan kastelon en Hungarijo; tre baldaŭ tiu grafo konsciĝis pri la genio de Schubert, sed ruze konservis tiun scion al si mem. Li proponis al Franz, ke li loĝigos kaj manĝigos lin ĉe sia domo en Vieno dum la vintro, kaj en la kastelo en la somero, kondiĉe, ke li instruos muzikon al liaj infanoj. Schubert ŝuldis tiom da mono, ke li konsentis; sed li ne estis feliĉa en la kastelo kaj multe suferis pro nostalgio. La tutan tempon li sopiris Vienon kaj siajn amikojn malgraŭ la malsato kaj malriĉeco, kiuj, li bone sciis, atendos lin tie. La grafan kastelon li priskribis jene: " Nia kastelo ne estas impona, sed ĝi estas bone konstruita kaj ĉirkaŭata de tre belega ĝardeno. Mi loĝas en la domo de la pedelo. Ĝi estas sufiĉe trankvila, escepte pro la anseroj, kiuj kune klakadas tiel bruaĉe, ke vi ne povas aŭdi vian propran voĉon. La kuiristino estas iom frivola, la ĉambristino havas ĉirkaŭ tridek jarojn; la kuireja servistino estas tre beleta kaj amikiĝis kun mi; la vartistino estas bonkorulino, kaj la ĉefservistino estas mia rivalo."

Grafo Esterhazy havis kuzon, grafon Stefano, kiu opiniis, ke li povas komponi. Li vizitis Schubert dum li estis en la kastelo kaj petis, ke li ludu novan fantazion, kiun li, la grafo, ĵus verkis. Schubert sidiĝis apud la fortepiano kaj malfermis la manuskripton. Li diris al si: " Kion mi vidas antaŭ mi? Kvazaŭ arbaron de strangaj ciferoj, kiuj sin tordas ĉirkaŭ la linio, kiel serpento! Kaj mi devas ludi ĉi tiun nelegeblan manuskripton!". Kompreneble kiam li komencis ludi li elektis arion el sia cerbo

kaj tuj improvizis; la amikoj de la grafo, kiuj ĉeestis, diris, ke veraj perloj melodij de plej granda beleco elsonis de la klavoj sub la magiaj fingroj de la juna majstro kaj iom post iom naskiĝis bela Romanco, intermiksita kun epizodoj kaj pliriĉigita per mirindaj modulacioj, sed la tuto estis laŭ la formo de la Fantazio, por ke la grafo ne suspektu komence, ke Franz improvizas. Sed, iom post iom, la ludanto tiom perdis sin en la ekstazo de sia inspiro, ke li tute forgesis, kial li ludas, la ĉeeston de la grafo kaj de liaj amikoj, eĉ la muzikon antaŭ si, kaj li tute forgesis turni la paĝojn, kiel li ĝis tiam faris por daŭrigi la iluzion. Unue la grafo estis kolera, kiam li konsciis la trompon, sed li tiel ĝuis la belecon de la muziko (kian, en sia koro li bone sciis, li neniam povus verki), ke kiam, je la fino de la ludado, Schubert petis lian pardonon, li tutkore lin pardonis, kaj la du viroj poste fariĝis bonaj amikoj.

Oni diras, ke ĉiu, kiu vizitis Schubert en lia loĝejo, ĉiam surpriziĝis pri la tuta manko de ia komforto. La granda ĉambro en kiu li laboris, pli similis la laborejon de metiisto ol la studejon de komponisto. Estis tie fortepiano kovrita de malorda amaso de muzikaĵoj; diversaj kordinstrumentoj, muziksubteniloj, diversaj tabloj kaj seĝoj, ĉio en la plej terura malordo. Moritz Schwind, unu el liaj amikoj, rakontas historieton, ke iun matenon li vizitis la komponiston kaj trovis lin ankoraŭ en la lito. Vidante sian amikon, Franz tuj elsaltis el la lito, kaj komencis rapide serĉi en tirkesto, elĵetante ŝtrumpetojn unu post la alia sur la plankon. "Kion vi serĉas, Franz? diris Moritz. - "Sentruajn ŝtrumpetojn", respondis Schubert, "ŝajne oni ne trikas tiajn nuntempe."

Schubert ĉiam estis tro malriĉa por povi edziĝi. Estis diversaj amaferoj en lia vivo, sed lia sola vere sincera amo estis por knabino, kun kiu li konatiĝis, kiam ili ambaŭ estis tre junaj. Ŝia nomo estis Teresa Grob; ŝi tute ne estis belulino: ŝi havis tre grandan kaj malbelan buŝon, kiu certe estis grava malhelpo al ŝi, ĉar ŝi posedis tre belan altsopranan voĉon. Franz estis tro sindetena por esti lerta amanto; li povis elverŝi sian tutan animon nur per sia muziko. Tamen, Teresa ŝajne lin bone komprenis kaj sendube li estus ĝoje edziĝinta kun ŝi se li ne estus tiel malriĉa. Ŝi vere amis Franz, sed ŝiaj gepatroj devigis

ŝin edziniĝi kun bakisto, kun kiu, kvankam li estis tre inda viro, Teresa ne povis esti vere feliĉa, ĉar ankaŭ ŝi posedis animon de muzikisto.

En 1823, resaniĝante de severa malsano, Schubert verkis tre belan kanton "Du bist die Ruh" (Vi estas la paco) kaj oni diras, ke liaj pensoj estis pri Teresa dum li ĝin komponis, ĉar li ĉiam konstatis, ke ŝi havas trankviligan influon al li kaj alportas pacon al lia animo.

Kvankam Beethoven kaj Schubert loĝis nur unu mejlon unu de la alia kaj kelkafoje vizitis la samajn gastejojn, ili ne interkonatiĝis, ĝis la vivo de Beethoven alproksimiĝis al sia fino. Pro sia surdeco Beethoven pasigis siajn lastajn jarojn tre izole; krome liaj amikoj troviĝis en pli alta tavolo de l'socio ol tiu konata de Schubert, kiu vere adoris la maljunan majstron, sed nur de respektinda distanco. Oni diras, ke antaŭ la morto de Beethoven, iu portis al li kelkajn el la kantoj de Schubert, inter ili "Die Junge Nonne", unu el la plej belaj kantoj verkita de Franz. Beethoven zorge tralegis la manuskripton, ĉar li jam ne plu povis aŭdi noton de muziko, kaj li diris: "Vere, en ĉi tiu Schubert vivas la dia fajro de genio! Kial oni ne konigis lin al mi antaŭe? Permesu, ke mi tuj vidu ĉi tiun junulon." Hüttenbrunner, amiko de Schubert, kondukis lin al la majstro, kaj dum ili staris sur la sojlo de la ĉambro, Beethoven diris: "Mi petas, ke Franz Schubert envenu unue," kaj kiam ili alproksimiĝis kaj genuis ĉe lia lito, li diris: "Vi, mia kara Hüttenbrunner, posedas mian koron sed Schubert posedas mian animon!" Schubert estis unu el la 38 torĉportantoj, kiuj akompanis Beethoven al lia lasta ripozejo. Revenante hejmen post la funebro, Schubert kaj kelkaj amikoj liaj

eniris gastejon por trinki vinon. Schubert levis la glason kaj tostis: "Al li, kiun ni ĵus ripozigis en eterna paco, kaj al tiu, kiu kuŝas apud ili!" Sencie li tostis je si mem, ĉar, la sekvantan jaron, en 1828, li mortis pro tifo, en la frua aĝo de 31 jaroj. Liaj lastaj horoj pasis en deliro, kaj li imagis, ke oni provas lin enterigi viva, kaj lia konstanta petego al sia frato, en kies domo li mortis, estis, ke ne estas Beethoven, kiu kuŝas sur la lito, sed Franz, kaj oni devas ne forporti lin.

Kiel dum la vivo, tiel en morto, li forlasis la mondon baraktante kontraŭ malbona sorto kaj malfacilaj cirkonstancoj. Li kuŝis pompe kun laŭra krono sur la frunto, vestita per la robo de ermito. Grandega homamaso trapasis lian mort-ĉambron por lastfoje vidi la viron, kiu tiom donis al la mondo, kaj tiom malmulte ricevis.

Kiom li ja donis, oni ne vere komprenis ĝis post multaj jaroj, ĉar, plejparte, liaj samtempuloj diris, ke la muziko de Schubert estas tiel tro malfacila, ke neniam oni povas ĝin ludi! Eble en tiu tempo tio estis vera, ĉar Vieno estis plena de amatoraj muzikistoj, kiuj tro fanfaronis pri siaj propraj vanaj provoj pri komponarto por povi kompreni la veran valoron de la majstraĵoj de Schubert.

GLADYS P. COSMETTO



Ne plu cerbumu! Rigardu la unuan kovrilpaĝon (franca adreso), aŭ la lastan (niaj perantoj).

**Ne prokrastu ĝis morgaŭ,**

**kion vi povas fari hodiaŭ.**

**Tuj pagu vian reabonon.**

## KVIZO

# DEK AKTIVAJ ESPERANTISTINOJ

La kvizo en tiu ĉi numero de "Kulturaj Kajeroj" temas pri dek virinoj, kiuj ludis diversajn kaj gravajn rolojn en la Esperanto-movado. Ĉu vi scias, kiuj ili estas?

1- La edzino de universitata profesoro en Tübingen esperantistiĝis en 1903, kiam ŝi estis 60-jara. Ŝi fondis Esperanto-literaturan asocion kaj, en 1908, estis la sekretario de la 4-a Universala Kongreso en Dreseno. Sekvintjare ŝi gajnis la unuan premion en la literatura turniro "Floraj Ludoj" de la Universala Kongreso en Barcelono.

2- Franca komercistino el Marsejlo lernis Esperanton en 1903 kaj fariĝis membro de la Lingva Komitato en 1910. Krom multenombraj gazet-artikoloj en Esperanto kaj en la franca, ŝi verkis romantikajn teatraĵojn sub la pseŭdonimo Roksano. Ŝiaj verkoj temas ĉefe pri virinaj problemoj en la socio.

3-Riĉa virino el Usono, la edzino de la usona ambasadoro en Belgio, esperantistiĝis en la 1920-aj jaroj kaj fariĝis dumviva membro de UEA. Dank'al ŝia malavareco estis eldonitaj en 1929 du nemalhaveblaj konsult-libroj en Esperanto: "Bibliografio de Internacia Lingvo" de Petro E. Stojan, kaj "Originala Verkaro de L.L.Zamenhof", redaktita de D-ro Dietterle.

4- Okaze de la eksplodo de la unua mondmilito en 1914, d-ro Zamenhof perdis kontakton kun sia frato, Felikso, dumvojaĝe restinta en Germanio, kaj sia filino, Sofia, laboranta kiel kuracistino en Ĥarkovo, Ruslando. Li turnis sin al esperantistino, en neŭtrala nordeŭropa lando, kaj petis ŝin helpi lin ekscii la sorton de siaj familianoj. Kiu estis tiu virino?

5- Virino de aristokrata brita familio, kiu aktivis en la movado por virina emancipado kaj poste okupiĝis pri la problemoj

de la laboristaro, fariĝis klasbatalema maldekstrulino. Lerninte Esperanton post la unua mondmilito, ŝi aliĝis al internacia laborista Esperanto-organizaĵo kaj sindecide kunlaboris kun la fondinto de la asocio.

6- La edzino de fama nederlanda esperantisto lernis Esperanton en 1909 kaj aktivis multflanke en la nederlanda movado. Ŝi invitis la 12-an Universalan Kongreson en Hago en 1920. Kune kun Andreo Cseh ŝi organizis en 1930 la Internacian Ĉe-Instituton de Esperanto. Por disvastigi ideon de mondfederismo inter esperantistoj, ŝi kaj Andreo Cseh fondis Universalan Ligon en 1942 kaj eldonis la revuon "La Praktiko", fonditan en 1932. Ŝi estis honora membro de UEA.

7- Virino, kiu estis radiotelegrafistino, esperantistiĝis en 1913 en Tallinn. Ŝi kunlaboris al la ĉefaj beletraj periodaĵoj aperintaj dum la periodo antaŭ kaj post la unua mondmilito. Krom verki originalan poezion en Esperanto, ŝi abunde tradukis ne nur el sia gepatra lingvo, la estona, sed ankaŭ el la germana kaj rusa lingvoj. Ŝi estis honora membro de UEA.

8- Loĝanto de Pollando, kiu naskiĝis en Esperanto-parolanta familio, studis la juron ĉe la Universitato de Varsovio, sed post diplomiĝo, ŝi dediĉis sin ekskluzive al Esperanto. Ŝi faris informad-celajn vojaĝojn kaj gvidis multajn kursojn en Esperanto, uzante la Ĉe-metodon. Ŝi estis la plej fama esperantistino en la bahaa religia movado.

9- Unu el la du nuntempaj virinaj membroj de Akademio de Esperanto lernis Esperanton en 1949. Profesie ŝi estis instruistino, direktoro de porinstrua altlernejo kaj lektorino pri la angla lingvo kaj literaturo. Ŝi verkas originale en preskaŭ ĉiuj ĝenroj: poezio, noveloj, teatraĵoj, eseoj kaj biografio. En la Belartaj Konkursoj de UEA ŝi ricevis la plej multajn premiojn, entute 21.

10- La publika esperantista vivo de tiu ĉi virino komenciĝis en 1958-59, kiam ŝi kunlaboris kun la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA por organizi la jubilean Universalan Kongreson en Varsovio. En 1959 oni dungis ŝin en Pola Radio, kie ŝi debutis kiel radioĵurnalistino. En 1962 ŝi transprenis de Teo Jung la eldonadon kaj redaktadon de "Heroldo de Esperanto".

## RESPONDOJ:

1- Marie Hankel (1844-1929), la reĝino de la "Floraj Ludoj" en 1909, gajnis la naturan rozon por sia poemo "La simbolo de l'amo". Ŝiaj versaĵoj aperis en pluraj Esperanto periodaĵoj kaj ankaŭ en aparta volumo "Sableroj" eldonita en 1911.

2- Jeanne Flourens (1871-1928) verkis la komediojn "Duonsurde" (1907), "La Fianĉiniĝo de Sovaĝulineto" (1909) kaj "Geedziĝpeto" (1913). Ŝia novelaro "La Senlaca Sinofero" aperis en 1912. Ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton verkojn de Alfred de Musset kaj L. Tolstoj.

3- Alice Vanderbilt Morris (1874-1950) interesiĝis pri la internacilingva demando post la unua mondmilito. En 1924 ŝi kunfondis la International Auxiliary Language Association (Internacia Helplingva Asocio). En la unuaj jaroj de sia ekzisto, IALA subtenis sciencajn esplorojn pri Esperanto kaj publikigis la rezultojn.

4- Margarethe Noll (1874-1962) el Kopenhago, Danlando, havigis al d-ro Zamenhof novaĵojn pri liaj frato kaj filino. Ŝi estis multjara aktivulino en la dana Esperanto-movado kaj la ĉefa defendanto de Esperanto kontraŭ la subtenantoj de Ido, inter kiuj estis ŝia samlandano, la fama filologo Otto Jespersen.

5- Ellen Kate Limousin (1879-1950) naskiĝis en Hindio, kie ŝia patro servis kiel kolonelo en la kolonia armeo. Ŝi iris al Parizo en 1926 por helpi Eugénon Adam (Lanti) en la redakciaj kaj administraj aferoj de Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT.

6- Julia C. Isbrücker-Dirksen (1887-1971) estis la edzino de inĝeniero J.R.G. Isbrücker, antaŭa prezidanto de Akademio de Esperanto. Krom organiza laboro, ŝi Isbrücker okupiĝis pri instruado, verkado kaj tradukado. Ŝi kaj ŝia edzo tradukis "Akbar" (1923), historian rakonton de Van Limburg Brouwer, kaj ŝi tradukis "La Alia Pasinteco" (1952), psikologian romanon de Rico Bulthuis.

7- Hilda Dresen (1896-1981) kontribuis tradukaĵojn el germanlingva poezio al "Svisa Antologio" (1929) kaj ĉefredaktis "Estona Antologio" (1932) Ŝiaj originalaj

poemoj aperis en "Dek du poetoj" (1934) kaj "Norda Naturo" (1967). Eldonita en 1975 estis "Kalevipoeg", ŝia traduko de fragmentoj de la estona popola epopeo.

8- Lidja Zamenhof (1904-1943), la plijuna el la du filinoj de d-ro Zamenhof, okupiĝis pri la instruado de Esperanto kaj ankaŭ organizaj aferoj. Cetere ŝi tradukis beletrajn verkojn de polaj aŭtoroj en Esperanton kaj ankaŭ la plej gravajn verkojn pri la bahaismo.

9- Marjorie Boulton (1924- ) estas elektita al Akademio de Esperanto en 1967. Ŝiaj originalaj poemoj troviĝas en la kolektoj "Kontralte" (1955) kaj "Eroj" (1959). Ŝia novelaro "Okuloj" aperis en 1967, la drama volumo "Virinoj ĉe la Landlimo" en 1959 kaj la biografio "Zamenhof, aŭtoro de Esperanto" en 1963. Unika publikaĵo estas "Rimleteroj" (1976), kolekto de korespond-aĵoj en verso inter ŝi kaj William Auld.

10- Ada Fighiera-Sikorska (1929-1996) naskiĝis en Pollando sed ŝi devis ekziliĝi en 1939. Post la milito ŝi revenis en sian patrujon, edziniĝis al Gian Karlo Fighiera kaj laŭvice loĝis kun li en Bruselo, Madrido kaj Torino, kie ŝi daŭrigis la redaktolinion de Teo Jung en "Heroldo de Esperanto".

Bernard GOLDEN

## GRAVA ALVOKO-

Naŭ urboj, Avignon (Francio), Bergen (Norvegio), Bologna (Italio), Bruxelles (Belgio), Krakow (Pollando), Helsinki (Finnlando), Praha (Ĉeĥio), Reykjavik (Islando), Santiago-de-Compóstella (Hispanio) estis elektitaj de la Eŭropaj ministroj de Kulturo, kiel "eŭropaj urboj pri kulturo en la jaro 2000".

Necesa estas interkonatiĝo por komuna agado de la esperantistaj grupoj de tiuj urboj. Kontakti: Esperanto-Grupo, 55, boul. Raspail, FR-84000, Avignon.

# IOM PRI MALJUNECO

S. BONIOL

De la Antikveco pritraktata estas la temo (oni pensu pri la homeraj eposoj). En nia okcidenta socio favoraj vivkondiĉoj ebligas, ke la morthoro pli kaj pli malfruiĝu; do tiu vivaĝo tiras la atenton je diversaj vidpunktoj. Fascina estus tuta esplorado tra la kvin kontinentoj, sed tiom longus, ke ĝi ne estas ebla. Tamen du ekzemploj en tre malsamaj tradiciaj socioj (unu el Sud-Ameriko, la alia el Afriko) espereble interesos la afablan legantaron.

**SUD-AMERIKO** - Ĉe la Inkaoj ne anstataŭigbla estis la vivsperto laŭlonge de la vivjaro akirita. Tial la maljunuloj estis, nek ekskluzivitaj, nek kondamnitaj je nenifrado, sed ili alprenis novan rolon akordigeblian kun ties korpo- kaj menso-kapablo kaj sanstato. En tia socio la tuta vivo, de la naskiĝo ĝis la mortotago, estis antaŭplanita. Tio dank'al popolhombrado ĉiun kvinan jaron okazanta. Nenifrado estis la plej veinda malbena. Ĉiu estis devigata sin okupi per utilaj taskoj.

Inter 50 ĝis 78 jaroj la maljunuloj estis taksataj sufiĉe lerte marŝi. La malfortviduloj purigis kotonon aŭ sengrajnigis malzospikojn. Inter 80 ĝis...150 jaroj oni konsideris la homojn nur kapablaj manĝi kaj dormi. Ĉiuj estis tre respektataj, obeataj; finfine ili ricevis la permeson jam ne plu labori. Sed kiuj ankoraŭ iometon scipovis, al tiuj estis petate taksitaj litkovrilojn, elfari ŝnurojn, prizorgi la domojn de la mizeruloj aŭ bredi kobajojn sur la platigita grundo. Ili estis ankaŭ komisiitaj skurĝi la malobeemajn geknabojn kaj ilin saĝoplene admoni. La nenipovuloj devis senpedikiĝi al si la kapon kaj porti la bestetojn al juĝisto-inspektisto... Ĉiu maljunulo ĝuis la kuneston de juna knabo, kiu lindorlotadis kaj respekteme lin prizorgadis. Tial malsanulejoj, maljunulejoj kaj emeritejoj estis eĉ nepenseblaj establoj.

Nuntempe en Ekvadoro ekzistas homoj, kiuj atingus la aĝon 150 jarojn; ĉu pura vero? Malfacile por diri. Ĉiokaze Ekvadoro estas la nura lando, kie grandaĝeco estas atestata de paroĥaj registroj. Tiaj dokumentoj de la jaro 1840-a datiĝantaj estis trovitaj en vilaĝo loĝata de 820 homoj. Ĝi situas en iu sankta valo (1500 metrojn alta), nur kelkajn metrojn malprok-

sima de la perua landlimo. Tie regas mirinde milda klimato (inter 19 ĝis 26 gradoj super nulo). Duono de la loĝantaro estas pli ol centjara. La viroj kultivas la grundon, la virinoj kudras sen okulvitroj, kapablas naski idojn ĝis la aĝo 60 jarojn, dum iliaj kunuloj ĝuas vigan seksan vivon ĝis la aĝo 100 jarojn; tiam ili ankoraŭ kapablas gravedigi virinon. Ĉu senpekaj sanktuloj? Ja ne; ili fumas inter 40 ĝis 50 cigaredojn tage, sed de tabako de ili kultivata, ne difektita de ĥemiaĵoj. Ili senmezure drinkas nedistilitan frukt-alcoholojn, sed ankaŭ pokvante trinkas tizanojn taŭgajn por malfruiĝi maljunigajn, reguligi la sangopremon, lukti kontraŭ reumatismojn kaj kanceron. Onidire la sekreto por eterna juneco tiu feliĉa homgrupo ŝuldas al orkideo, kies foliaro ne ĉesas verdiĝi. Eliksiron ili havigas al si el tiu mirinda floro kaj en ĝi kuŝas la mirindaj propaĵoj.

**AFRIKO** - En la estula hierarkio, la maljunuloj staras tuj post la mortitoj. Ĉar ili estas inter vivo kaj morto, al ili jam apartenas la povoj de ambaŭ vivuloj kaj forpasintoj. Povoj de la tempo kaj de la sankto. Tre grava montriĝas ilia rolo; tamen ne ĉiuj estas saĝontoj. En la vilaĝoj renkontiĝas vantuloj apud tiuj, al kiuj tute prave oni respektoplene omagas.

La unua rolo de maljunul(in)o en la afrika socio estas eduki. Ĉirkaŭ 80% el la grupanoj estas kamparanoj. Tie ja ne ekzistas infanvartejoj... La vartistan taskon la maljunul(in)o prenas sur sin. Al... la infanoj mankas ludiloj. Krom la bagatel-ajoj, kiujn tiuj mallertuletoj sukcesas prilabori por si, la ĉefa distro estas primoki la av(in)on. Sur kvazaŭa teatroscenejo la infanoj aktoras kaj uzadas sian imagopovon por insulti kaj ridindigi, ne por fundamenta malrespekto (ne decus!) sed amuzocelo. Tamen dum la vespero, ĉe fajrangulo, la geavoj reakiras iom da juneco por rakonti kaj mimi la tradiciajn fabelojn. Forgeblas sian lacon ili revigliĝas kaj dancadas antaŭ la mirigitaj okuloj de la spektantoj. Dank'al la maljunularo, senskriba socio kapablas memori kaj de generacio al generacio transdoni la etnan heredaĵon. Cetere kiam okazas malpaciĝo, kiam granda implikaĵo nepre devas esti solvata, oni sin turnas al la maljunuloj por scii kiamaniere, en la pasinteco, simila problemoj estis solvitaj laŭ la principoj de la kutima juro.

# LA SEKRETO DE LA REĜINO

Kiel konduktoro de tramo mi travivis multe da etaj aventuroj. Iufoje estis arestita en mia vagono, ĝuste kiam ni ekveturis antaŭ la kafejo Kuril, defraŭdinto Alfred Baumann, kiu sin defendis kun revolvero ĉemane. Mi estis en tiu afero ankaŭ vokita, kiel atestanto, kaj mia nomo aperis en la ĵurnaloj. Aliffoje veturis kun ni dĵa sinjoro en peltu, kiu ne havis transirbileton. Tamen li asertis, ke lia bileto estas ĝusta. Mi diris al li, ke li aŭ aĉetu novan bileton aŭ afable eliru. Li ekscitiĝis kaj dufoje min batis en la vizaĝon. Li ricevis pro tio, ĉe la distrikta tribunalo, kvardek ok horojn da mallibero. Skudil estis lia nomo. Kaj iam apud la jutfabro de Kratochvil, ni transveturigis maljunan barbulon. Mi memoras, ke, kiam kamarado Ĉekl subite ekbremsis, mi flugis inerte tra l'malfermita pordo sur la platformon. Mi vidis la maljunan viron; lia rompita kapo kuŝis sur bruna teko. La bedaŭrinda Ĉekl ricevis pro tiu malfeliĉo tri monatojn da mallibero kaj estis maldungita, kvankam, ĉe la esplora juĝisto, mi respondis favore al li laŭ mia tuta povo.

Sed mi pensas, ke la plej mirinda aventuro, kiun mi travivis, kiel konduktoro, okazis iun novembran sabaton sur la deksepa linio. Mi ne ofte veturadis sur tiu linio, kaj pro tio mi iom dediĉis atenton al la homoj, kiuj eniradis kaj malaperadis. Estis ĉirkaŭ la sesa vespere; ni veturis el la finstacio ĉe la arsenalo. La vagono estis apenaŭ duonplena. Kiam, ĉe la haltejo apud la kazerno de la 6-a infanteria regimento, mi ekfajfis por la ekveturo kaj eniris la vagonon, mi rimarkis, ke en la angulo ĉe la antaŭa platformo sidas junulino, sinjorino, kies admirinda aspekto min, tuj en la unua momento, iom konfuzis. Mi ne kredas la diron pri amo je la unua ekvido; precipe ne pri la mia al tiu ĉi sinjorino, sed marŝante al ŝi per balancantaj paŝoj, al kiuj mi alutimigis en mia profesio, mi sentis pruntedan malĝojon, kio okupas la ordinaran, simplan homon ĉiam, kiam li haltas antaŭ io, kontraŭ kio li sentas sin malgranda kaj mizera kaj je kio li ne rajtas pensi. Mi sciis, ke mi ne rajtas revii pri tiu virino alie ol kiel tramkonduktoro, kiu iam

vendis al ŝi bileton. Kaj efektive, kiam ŝi petis bileton al la finstacio en la parko, apud la areno, ŝi prezentis al mi monon tiel kiel oni ĝin ŝovas en servivan aŭtomaton. Kompreneble, mi nenion ja signifis por ŝi. Mi estis numero 437, kiu al ŝi vendis bileton por krono kvindek. Sed malgraŭ tio mi bedaŭris, ke hodiaŭ mi ne razis min.

Ni estis veturantaj el periferio en la urbon. Apud la kinejo Vitagraf envagoniĝis juna viro en griza malkara vintrosurtuto, kiu restis sur la antaŭa platformo. "Al la stacidomo! Al la stacidomo!" li diris rapide. Li transmetis sian teknon de sub unu brako sub la alian, prenis el sia poŝo etan horlibron, ŝovis en ĝin la nazon, foliumis, balancis la kapon, elprenis la horloĝon kaj ekmienis timpreme. Certe li tre rapidis. Mi, jam scias rekonii tiajn homojn! Sed post kelkaj haltejoj mi rimarkis, ke la homo malantaŭ la vitro grandokule rigardas la sinjorinon. Kiam, apud la teatrejo, ia dikulo leviĝis de la seĝo kontraŭ ŝi, la senpacienulo sur la platformo iris internen, sidiĝis, kaj komencis esplori la reklamajn gluaĵetojn sur la vagonmuroj, kvazaŭ ne estus klare al ni ĉiuj, ke dum tio li rigardas sian kontraŭulon kaj ke li estas tute konfuzita. Li eĉ surmetis gantojn, ŝtelrigardis al siaj botoj, kaj forigis blankan makulon de sia surtuto, per kiu li verŝajne ie ektuŝis muron.

Mi ne koleris tiun viron, kvankam iam similaj aferoj jam naŭzis min estante ja tro oftaj kaj ĉiam similaj. Ne pro tio mi diras, ke li donis al mi tri dek helerojn trinkmone. Ne pro tio. Sed li aspektis tiel agrable, lia rigardo estis tiel sincera kaj lia nekaŝata admiro tiel infane naŭva, ke mi tuj deziris lian sukceson. Mi diris al mi, ke nun ŝi povus tamen ekrideti al li! Sed ŝi sidis kontraŭ li en sia griza peltu, kun flavaj sukkenoj ĉirkaŭ la kolo, kaj manoj grizgantaj, kruĉigitaj sur la genuoj super malgranda mansaketo. Si ne elŝovis la genuojn en silkaj ŝtrumpoj, kiel iuj tion faras. Reĝino ne povis sidi pli bone dum festas revuo sur tribunalo laŭre girlandita kaj ombrita de flagrantaj flagoj. Tion mi iam legis kaj nun ekrememoris. Mi ĉeestis kvar klasojn de reallernejo kaj diligente mi prunteprenas librojn el la biblioteko por personaro de la urba tramkompanio. Tiel mi legas pri diversaj aferoj kaj malsaĝulo mi ne estas... Tiu ĉi certe estas virino, pri kiu povus esti verkataj rakontoj kaj eĉ romanoj tion mi ekkonis tuj.

Sed nun mi ne havis tempon por atentigi tiujn homojn. La tramo veturis en la urbo kaj la vagono estis plena. Ĉe l'haltejo antaŭ la stacidomo mi vidis, ke la viro stariĝis, ektusetis kaj ree sidigis. Post kelke da haltoj pliaj la vagono iom malpleniĝis, ĉar multe da laboristoj transiris al la linio sesa iranta al la laborista kolonio. Nur nun mi vidis, ke la viro ne eliris sed sidas kontraŭ ŝi kaj rigardas. La lumoj de neon-reklamoj ĉesis fluge pasi preter niaj fenestroj, la klaksonoj de aŭtomobiloj maloftiĝis; ni veturis preter la stadiono kaj tra la kaŝtanaŭbarba aleo, sub la Prezidenta Monteto, sursemita de vilaoj riĉulaj. Tie ĉi estis preskaŭ senhome. Kaj fine mi havis en la vagono ses-sep homojn; mi stariĝis sur la malantaŭa platformo kaj faris notojn pri venditaj biletoj. Kaj ree mi observis tiujn du. Subite frapis min io neordinara, ne-atendita, ia stranga malkvieto de la virino. Mi eĉ ne povis ne rimarki, ke ŝi kelkfoje rigardis lin kaj eltenis lian ekstazan rigardon, kvazaŭ komprenante. Kaj alfoje ŝi rigardis lin el sub sia ĉapelo embarase kaj klinis tuj la kapon, ĉar lia persista rigardo, peta, malfiera, malaŭdaca kaj senmensoga, ne cedis kaj konfuzis ŝin. Tiam amindumanton oni ne ofte vidas. La bedaŭrinda birdo estis tiel ravita, ke li ne kapablis sin regi. Nur nun mi ekpensis, ke li havis malgrandan bileton al la stacidomo, kaj ke li jam daŭrigas proksimume dekkvin haltejojn. "Pardonu. Ĝis kie validas via bileto, sinjoro? Bonvolu montri al mi vian bileton, sinjoro, mi petas." Li skuigis, palpis tra la poŝoj, poste deprenis la gantojn kaj palpis denove, montris al mi la horloĝon; sed kiam mi kapneis, li ruĝiĝis kaj ekridetis. Fine li elprenis la bileton kaj malfaldis ĝin per tremantaj fingroj. "Vi havas, permesu, bileton sole ĝis la stacidomo. Bonvolu aĉeti novan bileton, mi petas!", mi diris al li. "Jes, jes," li elbalbutis kaj elprenis monon, kiel en sonĝo. "Li dronas en tio ĝisorele," mi ekpensis. Nu bone, sed venas jam la antaŭlasta haltó. Tiuj du rigardas unu la alian. Liaj okuloj pendas sur ŝia vizaĝo, sur ŝia sino, sur ŝiaj kruroj. Kvazaŭ li ne povus sin satigi. Kaj ŝi ne povas ne vidi lian ravitecon. Ŝi vidas, ke li estas sorĉita, ĉarmita. Ŝi konscias, ke ŝi ne povas lin koleri, ĉar li ne estas ordinara, abomena, danda amindumisto. Ho, mi havas bonajn okulojn por tiaj aferoj! Ŝia rigardo estas tiel afaba kaj kvazaŭ iom petanta lin, ke li ne faru tion, kvazaŭ ŝi estus en granda

embaraso. Ŝi ekmoviĝis maltrankvile. Ni jam estis inter la lastaj du haltejoj. Subite tuta ŝi kaŭriĝis en sia angulo, mordetis la lipojn, zorgomienne ekrigardis al ĉiuj direktoj kaj subite ekrigardis lin, sed konfuze kaj senhelpe. Ŝi certe diras al si: nun ni elvagoniĝos kaj li venos al mi: "Pardonu, fraŭlino, ĉu vi permesos al mi akompani vin?" Tion ni konas; ankaŭ ni faris tiel! Ŝia rigardo diras, ke ŝi tion ne deziras. Kaj tamen, mi volus tion ĵuri, ŝi rigardas la junulon per okuloj tiel reĝece komprenemaj! Estas en tio granda komprenemo kaj pardonoto? Ne, ne, tion mi ne povis kompreni.

"Areno", mi vokas. "Ĉiuj eliru!" La aventuro finiĝas. Eble ĝi komenciĝos nun; certe, jes. Sed el tio mi jam nenion scios. Mi deziris al tiu homo ĉion bonan, ĉion plej bonan. Tiu senenergia, peta rifuzo ŝia estis kompreneble la lasta resto de la bona eduko. Ŝi estas filino el iu vilao super la rivero. La vojo tra la parko, preter la areno, plue preter la akvorezervujoj kaj Lunaparko, kaj de la akciza linio estas ankoraŭ almenaŭ dek minutoj. Jes, tio sufiĉos plene! Ĉe lia pasio! Tiu bonega junulo meritas bonan rezulton! Ĉu li ne lasis forpasi la vagonaron pro hazarda renkonto? Je ĉiuj diabloj, nun kiam ĝi plene ordiĝis en mia kapo, kiam ĝi komencas plaĉi al mi, estas fino. Mi volvis al mi cigaredon kaj fumis, promeneante sur la flava pavimo de la perono. Estis jam preskaŭ la sepa horo; dise venadis homoj; kelke da ili envagoniĝis. Kaj jen subite mi vidis, ke ankoraŭ ne estas la fino.

La persekutanto promenas apud la vagono, tien kaj reen, konsternita. En la vagono sidas la persukutato plue en sia angulo. Ŝi ne elvagoniĝis! Mi ensaltis en la vagonon. "Ni estas en la finstacio, fraŭlino!" Ŝi ekrigardis min per trankvila, reĝina, sincera okulo. "Mi ne sentas min bone," ŝi diris. Mi klinis min. Mi rapidos por akvo en la oficejon de la administracio; aŭ se la fraŭlino loĝas malproksime, mi telefonos por takso. Ne, ne, ŝi dankas. Ŝi veturos reen! Ŝi preferas ankoraŭ iom veturi. Denove mi klinis min. Do, tamen, ŝi nepre ne deziras esti akompanata. Mi ekrigardis la horloĝon. En tiu momento mi subite sentis, ke mi mem estas iom ebria pro tiu virino. Mi donis signalon por forveturi. La akra sono de fajfilo sin portis al la malluma senfolia parko antaŭ la areno.

(daŭrigota)

# NIA KONKURSO

## POR VIA DISTRO

Ĝi konsistas el 6 enigmoj, kiuj aperos en Kulturaj Kajeroj en tri sinsekvaj numeroj. Vi povas tuj sendi viajn solvojn al la redakcio, aŭ konservi ilin kaj sendi la ses solvojn en la fino de la konkurso. La respondoj estos akceptitaj ĝis unu monato post la apero de la du lastaj enigmoj.

Gajnos la 1-an premion, 1 000-frankan stipendion por restado en Gresillon, tiu kiu ricevos plej multe da poentoj.

La 2-a premio konsistos el 500-franka stipendio por restado en Gresillon.

La 3-a premio konsistos el 250-franka stipendio por aĉeto de libroj el nia Libro-Servo.

Grava atentigo: Du eraroj enŝoviĝis en la tekstojn de la 1-a kaj de la 2-a enigmoj.

1-a enigmo: la trovota vorto konsistas el 12 ( ne el 13) literoj. Sekve, "7- monato" malaperas.

2-a enigmo: horizontale: 1- ordonpovo (ne "ordenpovo").

**3-a enigmo** (14 poentoj)- 1-Donu la nomon de la aŭtoro kaj la titolon de la libro el kiu estas eltirita la jena paragrafo: " Tamen eĉ latina estas malfacila, plena je antikvaj formoj senutilaj, manka je modernaj esprimiloj. Pli simpla, pli taŭga por uzado nuna devus esti la revita lingvo. Ĝi devus esti tuj fjernebla kaj uzebla de la popoloj mem, ne nur de kleruloj."

- 2- Kiu estis la gepatra lingvo de D-ro Zamenhof?
- 3-Kio grava por Esperanto okazis en 1908?
- 4-En kiu UK oni unuafoje ludis "Hamleton" en Esperanto?
- 5-En kiu jaro aperis la unua eldono de S-ro Tadeo?
- 6-Kiu libro de Kalocsay-Waringhien estis eldonita en 1932?
- 7- Kiu tradukis en Esperanton "Jane Eyre" de Ch. Bronte?
- 8-Kiuj estas la aŭtoroj kaj esperanto-tradukinto de "Mimi Pinson"?
- 9-Sub kiu titolo aperis kolekto de noveloj de J. Baghy en 1934?
- 10-Du verkoj de H.G.Wells, tradukitaj de E.W.Amos aperis en 1938.

Donu iliajn titolojn.

**4-a enigmo:** (10 poentoj)- 1- Kompletigu la jenan tekston: "Tion dirante Idris bategis... kamelon per la vipo, kaj la aliaj sekvis... ekzemplon. Dum kelka tempo oni nur aŭdis la surdajn frapojn de la dikaj vipoj ... fortajn manfrapojn, kaj la ... Jala!- En la sudokcidento la dube-blanka horizonto iĝis malhela. La varmego daŭris kaj la suno ... la kapojn de la rajdantoj. La Vulturoj evidente multe pli altan flugis, ... la ombroj de ... flugiloj iĝis pli kaj pli malgrandaj, kaj fine tute malaperis. (Por ĉiu ĝuste trovita vorto estos aljuĝita unu poento, sed por ĉiu eraro, oni forprenos unu poenton.)

2- trovu la titolon de la libro el kiu estas eltirita la ĉi supra teksto kaj la nomon de la aŭtoro.

# LA VIVO EN GRESILLON

## RAKONTO

"Ohe! Ohe! Jen ni!" Virinaj voĉoj. Ne facile estas trovi la fonton de tiuj krioj, ĉar la bruoj ne sekvas rektan vojon. Ili serpentumas inter la arboj kaj heĝoj, ĉirkaŭiras la trunkojn, glitas sur la surfaco de la lageto. De oriente? de okcidente? Stultulo mi estas! Tre verŝajne temas pri novalvenantoj, kiuj...alvenas laŭ la ...alvenvojo! Tiel frue? Kaj piede? De la stacidomo? Ili ne pensis, ke ili povas telefoni.

Du viroj. Du virinoj. Junaj, fortaj, kun valizoj ĉemane. Ili ridas, laŭaspekte ne lacaj, kvankam ili piediris du kilometrojn kun ŝarĝo. Saluton! Estu bonvenaj!" – "Saluton! Ni foriris matene anstataŭ posttagmeze. Ni tiom sopiris pri tiu vojaĝo...La unua tiel longa por mi." – "Ni tiom deziris eliri el Parizo!" – "Ni tiel longe pensis pri tiu vojaĝo al la kamparo!" – "La unuan fojon mi konatiĝas kun la kamparo. Jes, la unuan fojon!" Ili rakontis, ke ili loĝas en malbenita zono-parto de Pariza ĉirkaŭurbo, kie la naturo aŭdacis manifestiĝi nur per herbaĉoj kaj kriplaj arboj. La viroj laboris en gas-produktejo kaj la virinoj en butikoj de la kvartalo. Do! Pensu! Vera kamparo kun libere kreskantaj altaj arboj! Imagu! Ili vivos du semajnojn en kastelo! Eble la brakoj estas lacaj pro la pezo de la pakaĵoj, sed la okuloj senlaciĝe englutas tute novajn pejzaĵojn. La du paroj reagis, kiel malsatuloj antaŭ pladoj plenaj je bongustaĵoj.

"Kio estas tio?" demandas unu el la virinoj. "Banejo." – "Oni rajtas sin bani?" – "Jes, kompreneble. Kiam vi volos." – "Tuj!" , kaj ŝi lasas sian pakaĵon fali teren, demetas sian robon. Vestita nur de siaj subvestaĵoj ŝi rapidas kaj sin ĵetas en la akvon. Krio: "Yvette! vi ne scipovas naĝi " Plu! Rapide senpantaloniĝinte, unu el la viroj siavice sin ĵetas en la akvon, sed ne por bani sin; Li helpas la virinon, kiu komencas trinki iom da akvo. Kiam ili elgrimpas mi konstatas, ke la ventro de la virino estas iom ronda. Jes. Vi divenis. Ŝi estas graveda! Revestinte sin, la paro, kun la geamikoj, sekvas la gvidanton ĝis sia ĉambro ĉe la dua etaĝo. "René! ĉu vi vidis la ŝtuparon?" – "He! Rigardu la salomon! Ni vere estas en kastelo!" Plezuro por ili ...kaj ankaŭ por la gvidanto. Ili kondukas, kiel geknaboj antaŭ prirevita ludilo. La vidaĵo, de la fenestro de la ĉambro, estas belega; oni kontemplas ne nur diversspecajn arbojn sed ankaŭ la lageton kun la korforma insuleto. "Mi ne kredis, ke iam mi vidos tion!"

Belega naturo! Sed la homoj? Kiuj, kiaj homoj ili renkontos ĉi tie? Jen ili, tiuj homoj, kiuj eliras el la kurso-ĉambroj. Ne necesas prezenti la novalvenintojn. Tion ili mem faras: "Ni venas de la Pariza regiono. Kaj vi?... " – "Ni estas laboristoj ĉe fabriko. Kaj vi?... " – "René, neniam mi pensis, ke iam mi premos la manon de farmaciisto, de universitata profesoro. René. Ĉu vere estas ni ĉi tie?" ... "Sinjorino, estas iu loĝanto, kiun vi ankoraŭ ne renkontis. Sed, verŝajne, post ne longe vi vidos lin. Vi vidos Jozefon, la fantomo." – "Ĉe vere estas fantomo?" – "Jes", respondis Marteno. "En ĉiu kastelo estas fantomo." – "Kiel ĝi aspektas?" – "Ĝi marŝas aŭ flugas. Ĝi bruas aŭ silentas. Ĝi estas nigra aŭ blanka. Sed ĝi tute ne estas malamika." – "Brr... Mi timas. Espereble mi ne renkontos lin."

La postan tagon, post la vespermanĝo, granda parto de la ĉeestantaro kuniĝis ekstere. Kelkaj ludas globojn; aliaj babilas antaŭ la kastelo aŭ tutsimple promenas. Subite aŭdiĝas krioj nekompreneblaj! Ŝajnas, ke la voĉoj falas de la ĉielo. Fakte ili venas de la dua etaĝo, tra malfermita fenestro....De la ĉambro, kie loĝas la ĵusalvenintaj paroj. Ĉe la fenestro aperas du blankaj formoj, homoj kovritaj per litukoj. La krioj fariĝas kompreneblaj: "Fantomoj! Fantomoj!" Ĉiuj ekridis: ankaŭ la du edzoj, kiuj globludis. Ludemaj junulinoj! Hu,

hu! Fantomoj. " Ni rekonis vin. Ne insistu! Venu kun ni!". La edzoj krias: "Sufiĉas! Ne plu klaŭnu! Venu kun ni!" Sed la krioj daŭris; unu el la virinoj kvazaŭ ploris. La blankaj formoj staris ĉe la fenestro-aperturo kaj rigardis internen. Ili svingis siajn brakojn. Fine io ŝajnis al ni ne normala. Ŝajne, la virinoj estis vere teruritaj. Kiu estis tiu "fantomo" tiel minaca? Kun amiko ni rapidis supren. Kiam ni malfermis la pordon de la ĉambro, la fluganta nigra "fantomo", fuĝigita, preskaŭ tuŝis niajn kapojn. Temis pri iom dika vesperto, kiu aspektis tiel terurtrafita, kiel niaj blankaj virinaj fantomoj ŝirmitaj per littukoj....

Fine de la du-semajna restado, kiam ili foriris, niaj du paroj estis malĝojegaj. "Ni travivis semajnojn, kiajn ni verŝajne ne plu konos." -  
 "Kastelaninajn tagojn, ja, ni travivis", diris la patriniĝantino, kun larmo en okulangulo. Ĉu vere kastelanecan vivon ili spertis? Ne kutiman, certe; en medio, kiu proponas multon,..... ankaŭ fantomon!

P.B.

## LIBRO-SERVO

### NOVAJ AKIRITAĴOJ:

Esperanto au service de l'enseignement du français (J.P. Ferrari) 73 fr.

|                          |         |
|--------------------------|---------|
| Knaboj de kastora rivero | 34 fr.  |
| Kubaj popolaj fabeloj    | 15 fr.  |
| Plena poemaro (Miĥalski) | 112 fr. |
| Vortoj de Valo           | 55 fr.  |

Petu la katalogon de S-ino J. Vincent, 26bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE



Kien li iras

Al GRESILLON  
kompreneble

Ĉu ankaŭ vi

# GRAMATIKO PER BONHUMORO



## Pri la artikolo

Oni uzas ĝin, kiam la persono (aŭ la objekto) estas jam konata.

— la patro de la edzino.

**RIMARKO** : nemiam LA antaŭ propraj nomoj

— nek antaŭ : Ambaŭ, ĉiuj, kies.

Por esprimi ĝeneralan sencon, oni diras :

— donu al mi akvon por trinki.

— vidvino havis du filinojn (tamen nur **unu** personon).

**IU - IA - certa-kelka** montras aferon nedifinitan :

— oni atendas iun sinjoron- iaj strangaj sonoj ĝemas.

— en certaj okazoj, mi agus alie — kelkaj personoj kredis tion.

---

## Libertempa distraĵo por ĉiuj :



Vidu kiel beletaj ili estas ! Ja, ankaŭ vi, antaŭ ol foriri al via feria restadejo, ne forgesis la tutan kolekton de viaj fotoj : infanoj, gepatroj, amikoj... Kiom ĝojaj estas viaj novkonatoj !


## Ĉiam kun rideto !



Ja vi konas la sekreton de tiu dinamika direktoro de kulturdomo, kiu scias kombini laboron kaj sporton

---

## Rekordo :



Feliĉe, ni havis la ĵurnalistojn ! Aŭskultu tion, kion ili skribis : " Estas la plej spektinda akcidento, kiu okazis sur aŭtovojo, dum la dek lastaj jaroj ! "

## Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

**Belgio** : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

**Britujo** : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundo

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 krono,

**Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

**Germanujo** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frai (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

**Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 pe

**Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura (20.000 liroj).

**Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TO

**Jugoslavio** : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

**Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

**Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

**Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

**Portugallio** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

**Svislando** : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

**Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

**Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ  
Maine-et-Loire  
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuala lajn ajn karavanojn frue anonciĉajn

### Akceptas :

Por ripozl trankvile en atmosfera frateca ;  
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;  
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;  
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;  
Por studi specialajn problemojn ;  
Por inter amikoj gaje libertempi ;  
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34